

Kiel alveni?

El la flughavenoj Zaventem kaj Charleroi ekzistas rektaj trajnlinioj al Antverpeno. Trajnoj el Parizo, Bruselo kaj Amsterdamo haltas en Antverpeno.

Postkongreso

Ĝi okazos en Valonio de vendredo la 12a de majo ĝis dimanĉo la 14a de majo. La partoprenantoj povos per rekta trajno vojaĝi vendredomatenon de Antverpeno al Charleroi (Karlöreĝo). Jen la programo kun tri ekskursoj:

- Vendredon la 12an de majo: vizito de “le Bois du Cazier” en Marcinelle.
- Sabaton la 13an de majo: vizito al la muzeo de la milito en Bastogne.
- Dimanĉon la 14an de majo: vojaĝo per la trajneto de la tri valoj en Mariembourg kaj vizito al la muzeo de la vaporfervojo en Treignes.

La partoprenantoj loĝos en la junulargastejo de Charleroi kiu situas tuj apud la stacidomo. Aliĝi oni devus fari ĝis la fino de 2022.



verden



retadreso: info@ifef2023.net ★ retejo: <http://ifef2023.net>

Foto: w.wiki/4\$un



74a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso

Temo: transporto kaj daŭripova evoluigo

Antverpeno 6-12 majo 2023

Postkongreso en Valonio 12-14 majo 2023



Unua informilo

Organizantoj

Flandra Esperanto-Ligo (FEL) kune kun la aktivuloj de BAFE (*Belga Amikaro de Fervojistaj Esperantistoj*), sekcio de IFEF (*Internacia Fervojista Esperanto-Federacio*) organizas la 74an IFEF-kongreson en Antverpeno. Michèle De Meyere organizas la postkongreson en Valonio. En 1964 jam okazis IFEF-kongreso en Bruselo kaj en 1983 en Ostendo.

La kongresurbo Antverpeno

Ĝi estas la plej granda urbo en Flandrio, la norda nederland-lingva parto de Belgio. Temas pri urbo kun vizitinda historia centro, granda haveno kaj belega ĉefstacidomo.

La kotizoj

La kotizoj por la aliĝo aplikas la saman distingon inter A-landanoj kaj B-landanoj kiel la Universalaj Kongresoj de UEA. Membroj de IFEF/BAFE ricevas konsiderindan rabaton. La prezojn por la loĝado, la manĝoj, la ekskursoj kaj la postkongreso ni komunikos aŭtune 2022 en la dua informilo ĉar la prezoj por 2023 ankoraŭ ne estas fiksitaj. La aliĝilo kaj la mendiloj por loĝado, manĝoj, ekskursoj kaj postkongreso estos haveblaj en la kongresa retejo kaj mendeblaj en papera formo ĉe la organizantoj: info@ifef2023.net.

La kongresejo

Ĝi situas en la historia centro de Antverpeno je dudekminuta promendistanco de la centra stacidomo. Temas pri moderna junulargastejo kun komfortaj dormoĉambroj kaj agrablaj kunven-salonoj. Por partoprenantoj kiuj frue aliĝas kaj restos dum la tuta kongreso, la organizantoj rezervis kvanton da dulitaj kaj kvarlitaj ĉambroj. Ankaŭ manĝoj trifoje tage estas mendeblaj. LKK aperigos liston kun apudaj hoteloj. La partoprenantoj devos mem mendi ĉambron en la hoteloj.

La kongresa programo

La temo de la kongreso estas ‘Transporto kaj daŭripova evoluigo’. Ĝin traktos prelegoj kaj diskutgrupoj. Ne povas manki la fakprelegoj de IFEF pri fervojaj temoj. Speciala kunveno de la projektgrupo de Erasmus+ VERDEN okazos dum la kongreso. Ni provos organizi ampleksan libroservon. Ni invitas partoprenantojn ĝustatempe informi la organizantojn pri intenco partopreni kaj eventuale kontribui al la programo.

Provizora programo

Sabato 6 majo

Alveno kaj akcepto. Interkona vespero.

Dimanĉo 7 majo

- mateno: solena inaŭguro kun komuna foto
- posttagmezo: vizito de la urbo kaj de la centra stacidomo
- vespero: prelego pri Antverpeno kaj Flandrio kun popola muziko

Lundo 8 majo

- mateno: kunsido de la Faka Komisiono / Esperantokursoj
- posttagmezo: atelieroj
- vespero: la venonta kongreso sin prezentas

Mardo 9 majo

- mateno: ĉefaj fakprelegoj kaj aliaj prelegoj / Esperantokursoj

- posttagmezo: faka ekskurso al Trainworld en Schaarbeek (Bruselo)

- vespero: kultura vespero

Merkredo 10 majo

- mateno: plenkunsido/ Esperanto-kursoj
- posttagmezo: movadaj aferoj kaj Solena Fermo
- vespero: kultura vespero

Ĵaŭdo 11 majo

- tuttaga ekskurso per buso al la haveno de Antverpeno kaj al la muzeo de la vaporfervojo en Maldegem. Ni veturos tie per vaportrajno.
- adiaŭa vespero

Vendredo 12 majo

forveturo al la postkongreso en Charleroi